Sankteco

Pensante pri sankteco, kio venas en vian menson? Ĉu iu netuŝebla, persono ĉirkaŭita de aŭreolo? Nu en la Biblio – sankta libraro – la baza signifo estas io apartigita, kaj la unua apero de la vorto 'sankta' estas en Gen.2:3 kie Dio ĉesis de sia laboro post la ses tagoj de kreitado. Tie ni legas, ke Li sanktigis la sepan tagon. Tio signifas, ke la sepa tago estis ekde tiam iel apartigita de la aliaj tagoj. Neniu pli estas skribita pri tio en la tuta Genezo, eĉ ne la vorto 'sankta'. Ĝi troviĝas en Eliro 3:5 kie anĝelo de la Eternulo diris, ke Moseo deprenu la ŝuojn ĉar *'la loko sur kio vi staras estas tero sankta.'*

Tio estis la komenco de nova epoko en la Dia pritraktado de la homoj. Ekde tiu tempo Dio elektis la idaron de Izraelo por esti aparta popolo, *'popolo sankta'* (El.19:6). Kial? Moseo klarigis al ili post la vagado tra la dezerto – *'Ne pro tio, ke vi estas la plej grandnombra el ĉiuj popoloj, la Eternulo ekdeziris vin kaj elektis vin, ... sed pro la amo de la Eternulo al vi, kaj por ke Li plenumu la ĵuron, kiun Li ĵuris al viaj patroj ...'* (Read.7:6-8) Ekde la tempo de ilia eliro de Egiptujo, precipe pri la tabernaklo, Dio ordonis ĉion por emfazi, ke ili estas sankta popolo kaj, ke Li mem estas Dio sankta. Ĉiuj leĝoj kaj ordonoj en la Mosea leĝo celis instrui la diferencon inter la sankta kaj la nesankta. (Lev.10:10)

Ĉiuj el la multaj ordonoj pri la tabernaklo – pri la pastroj kaj Levidoj, la specialaj vestoj, la sanktaj oleo kaj incenso, kiujn oni devas ne uzi por io alia, kaj la ofta, zorga lavado – celas montri, ke la homoj estas malpuraj pro la peko. Ili povas alproksimiĝi al Dio nur laŭ tiaj severaj leĝoj. Simile la ordinaraj homoj devis observi multajn leĝojn pri puraj kaj malpuraj manĝaĵoj, pri korpa pureco kaj pri malsanoj infektaj. Multaj el tiuj ordonoj estas saĝaj eĉ nun por la sano, sed aliaj, kiuj ŝajnas al ni iom strangaj, celis apartigi la Izraelidojn de la idoladoraj kutimoj de la ĉirkaŭitaj nacioj.

Tra la tuta Malnova Testamento Dio emfazis, ke ili devas esti sanktaj pro tio, ke Li mem estas sankta. (Lev.11:44, 19:2) Tamen ili malsukcesis; ili plejparte preferis esti kiel la nacioj inter kiuj ili loĝis, tial la Eternulo forpelis ilin el Sia lando: *"...ili ne distingas inter sanktaĵo kaj nesanktaĵo, ne montras la diferencon inter malpuraĵo kaj puraĵo ..."* (Jeĥez.22:26)

Kompreneble la Eternulo bone sciis, ke tio okazos, tial Li intencis sendi Jesuon, kiu ja plenumis tiun leĝon. Nur Jesuo, al kiu ĉiu buĉofero de la Mosea leĝo antaŭmontris, obeis ne nur la laŭliterajn ordonojn, sed la spiriton al kiu ili celas. Pro tio li nomiĝas *'la sanktulo de Dio'* (Ag.3:14), estante nia ekzemplo kaj nia *"ĉefpastro, sankta, senpeka, senmakula, apartigita for de pekuloj ..."* (Heb. 7:26)

Tiuj el ni, kiuj jam aparteniĝis al Jesuo per bapto en lian nomon, vivas laŭ pli bona leĝo ol tiu de Moseo. Ni lernas kiel Jesuo komprenis la spiritan intencon de la Mosea leĝo en la prelego sur la monto en Mt.5,6 kaj 7. Li tie montris, ke la laŭlitera obeo de tiu leĝo tute ne sufiĉas. Ekzemple ne sufiĉas nure ne mortigi; ni devas ne eĉ malami malamikon. Por ni pureco ne konsistas el lavado de la korpo, vestoj aŭ iloj, sed el niaj koroj, niaj internaj pensoj kaj

emoj. Nia sanktigeco estas per la Spirito (2Tes.2:13) Ĉu iu el ni povas pretendi, ke ni vere plenumas tiun leĝon de Jesuo? Se ne, ni ne povas esti sanktaj.

Tamen Paŭlo alparolis ĉiujn kredantojn sanktuloj, kaj tia ni devas esti ĉar la verkinto de Hebreoj avertas, ke sen sankteco ne ne vidos la Sinjoron (Heb.12:14). Ni montras tiun sanktecon per nia amo de unu al alia, kaj la Sinjoro mem volas direkti nin tiucele por ke niaj koroj fariĝu *'senkulpaj kaj sanktaj antaŭ nia Dio ...'* (1Tes.3:11-13). Paŭlo petegis la Koloseanojn: *"Surmetu do, kiel elektitoj de Dio, sanktaj kaj amataj, koron de kompato, bonkorecon, humilecon, mildecon, toleremecon; reciproke paciencante kaj pardonante, se iu havas plendon kontraŭ iu; kiel la Sinjoro pardonis vin, tiel vi ankaŭ faru; kaj super ĉion surmetu amon, kiu estas ligilo de perfekteco."* (Kol.3:12-14)

Ni vidas, do, ke la principo estas la sama en la Malnova Testamento kaj en la Nova. Dio ne volas, ke Sia sankteco nin forpelu de Li sed, ke ni alproksimiĝu al Li. En la dezerto Li ne volis, ke Moseo forkuru sed, ke li alproksimiĝu, kvankam sole laŭ la ĝusta maniero. Por Moseo tio estis, ke li deprenu la ŝuojn; la Izraelidoj devis kunporti buĉoferojn; kaj ni? Dio volas, ke ni estu sanktaj: *"...Li elektis nin en li (Kristo) antaŭ la fondo de la mondo, por ke ni estu sanktaj kaj senmakulaj antaŭ Li en amo ..."* (Efes.1:4) Ni povas alproksimiĝi al Li nur pere de bapto en Kriston. Baptinte en Kriston ni aparteniĝas al li, ricevante pardonon de niaj pekoj, tiamaniere fariĝante sanktaj. Neniu el ni kapablas esti sanktaj pere de niaj propraj agoj; necesas, ke ni estu pardonitaj en Kristo. Necesas, ke ni montru nian enkristan sanktecon per nia amo unu al alia. Sen tia amo ni ne vere estas disĉiploj de Jesuo. Same kiel la Izraelidoj ni nature emas fari laŭ la agoj kaj kutimoj de la homoj inter kiuj ni loĝas. Estas nature malami tiujn, kiuj nin vundas; estas nature ofendiĝi, koleri,forturni la vizaĝon de tiuj, kiuj kalumnas nin, sed la tuta celo de nia nova vivo en Kristo estas venki tiajn naturajn, homajn emojn.

Eĉ plue, same kiel eblis, ke Izraelido povus diligente plenumi ĉiujn regulojn kaj oferojn de la Mosea leĝo nesincere, eblas, ke kristano diligente bonfaradas laŭ la videblaĵoj sen sincera amo por Dio kaj najbaro. La Eternulo malakceptis la oferojn de la Izraelidoj ĝuste pro tio ke ili *"... alproksimiĝas per sia buŝo kaj honoras Min per siaj lipoj, sed ilia koro estas malproksime de Mi, kaj ilia timo antaŭ Mi estas nur lernita ordono de homoj ..."* (Jes.29:13) Vere Dio rigardas la koron, ne la eksteraĵojn. Krom se ni sincere, en la koro, amas – kaj nur Dio scias tion – ni ne povas esti sanktaj. Ne eblas trompi la Sinjoron, kiel la sperto de Ananias kaj Sapfira montras (La Agoj 5). Se do ni volas donaci monon, kiel tiuj, aŭ fari iun ajn bonan, ni faru tion en sincera amo, ne por ricevi aprobon de la homoj. Agnoskante la danĝeron Jesuo avertis, ke ni *"... ne faru vian justaĵojn antaŭ homoj, por esti alrigardataj de ili; alie vi ne havas rekompencon ĉe via Patro .."* (Mt.6:1)

Se sankteco estas nia enkora celo ni povas ĝoje antaŭrigardi la tempon kiam nia batalo kontraŭ la homa naturo finiĝos kaj ni estos inter la sanktuloj kiuj restos sanktaj (Apok.22:11).

"Venu, Sinjoro Jesuo." Jean Field